

LAŬOKAZA NOVAĴLETERO

Organo de la Internacia
Komerca kaj
Ekonomia
Fakgrupo

579
1.5.1988

[Provizora sidejo de
Hornisyrstrasse 8
7580 Birmm 16.
FR Garmunlo



Numero 20

MAJO 1988

MALFERMITA LETERO DE LA PREZIDANTO

Estimataj gekolegoj kaj samideanoj,

Tre longe vi devis atendi la lastan numeron 19 de nia komunikilo. Mi tre bedaŭras tion kaj mi pardonpetas vin pro tia prokrasto. Antaŭ vi kuŝas nun la n-ro 20, kaj per tio ni atingis nian normalan aperdaton.

Ĉefa raportaĵo en ĝi estas la estraraj jarraporto pri la agado kaj la financa raporto de IKEF por 1987. Vi legos, ke nia fakgrupo ankaŭ dum la pasinta jaro progresis, kvankam nun pli da dinamismo estas necesa.

En ĉi tiu kajero troviĝas ankaŭ rekorda aro de identecŝildoj de membroj niaj. Tio pruvas, ke niaj membroj volonte akceptas la tiaman ideon de d-ro Picasso pri la identecŝildoj. Ili estas vere utilaj kaj helpaj por bona interkonatiĝo inter la membraro. Por plia prospero kaj sukceso de IKEF efektive necesas, ke la membroj ankaŭ individue renkontiĝas, interŝanĝas spertojn ktp. Ju pli da membroj ni havas, eksponente des pli da renkontiĝoj kaj interkomunikiĝoj inter ili eblas kaj devus okazi.

Hodiaŭ mi volas instigi tiujn membrojn, kiujn ankoraŭ ne prezentis sian identecŝildon en nia Novaĵletero, ke ili sendu ĉin baldaŭ al s-ro F.-X. Gilbert, Vert Coteau, Longeville en Barrois, F 55000 Bar le Duc, por aperigo en venonta Laŭokaza Novaĵletero. Kiam tiu aperigo estos kompleta, ni eldonos apartan liston (kolektaĵon) pri ĉiuj aperintaj identecŝildoj al nia membraro.

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

La Estraro:

S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝen. Sekretario

S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto

D-ro István Gether

S-ro Francois-Xavier Gilbert

S-ro Lawrence Mee

D-ro Marco Picasso

S-ro Scikó Yamasaki

Revizoro por la financa raportoj: D-ro Gianfranco Polerani

Centra sidejo (provizora):

Hornisgrindestr. 8

D-7580 Buhl 16 (FR Germanio)

Financa sidejoj:

Visspanstraat 97

B-800 Brugge/Belgio

Aparta surprizo kaj plezuro estis por mi - certe ankaŭ por vi - la "enkoreigo" de nia numero 18 (kajero de novembro 1987) fare de niaj koreaj membroj. Longdaŭre mi estis pensinta, ke personoj el Koreio ja troviĝas sur nia memrolisto, sed ke ili ne ŝajnas aktivaj rilate al la celo de IKEF, nome disvastigi Esperanton en komerco kaj ekonomio. Ĝis kiam tiu surpriza Laŭokaza Novaĵletero en korea skribo alvenis. Niaj koreaj membroj intencas nun agadi dum la ĉi-someraj Olimpikaj Ludoj en Seoul. Brave!

Ankoraŭfoje pri nia Laŭokaza Novaĵletero en Esperanta lingvo. Bedaŭrinde ne montriĝis taŭga la ĉisnuna eldonsistemo, laŭ kiu mi estas redaktoro kompilante la malneton kaj sendante ĝin al Budapeŝt, kie ĝi estas retajpota, kopiota, faldota kaj forsendota.

Ni serĉis nun alian vojon. Por senŝarĝigo mia, s-ro Lawrence Mee, Britio, transprenos la taskon de redaktoro por la Laŭokaza Novaĵletero, dume mi restos prezidanto kaj ĝenerala sekretario. Kiel pensiulo s-ro Mee certe havas sufiĉe da tempo por montri al ni sian senlakan aktivecon konatan de antaŭe. Probable jam la venonta numero estos redaktata de li.

La ĉisnuna tasko de la Ekonomikista Grupo de HEA, nome finprepari, kopii kaj forsendi la Novaĵleteron al nia membraro, efektivigis ĉi-foje s-ro F.X. Gilbert, Bar-le-Duc, Francio. Tio estis decidita antaŭ ol la n-ro 19 el Budapeŝt - ĉi-foje bel-aspekta kaj senerara sed malfruiga - aperis. Do ni havos estonte eble du eblecojn por fari tiun laboron.

Per tio mi adiaŭas min de vi kiel redaktoro.

Via Franz Josef Braun

GRAVA ATENTIGO AL NIAJ MEMBROJ

1. La Estraro prezentas sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 1987 kaj proponas akcepton de tiu raporto.
2. La Estraro prezentas la financon raporton por la jaro 1987, notante, ke la ciferoj de la raporto estas prezentitaj en bona tempo al la kontrolo de la revizoro. Li juĝis ilin bonaj kaj en ordo. La Estraro proponas akcepton de tiu financa raporto.
3. La Estraro notas la sumon de financa gajno de 5636 belgaj frankoj kaj proponas aldonon de tiu gajno al la kapitalo.
4. La estraranoj Braun kaj d-ro Picasso, elektitaj en 1986 per Perpoŝta Referendumo, baldaŭ estos du jaroj en sia ofico. Laŭ nia statuto, alineo 7.1 dua frazo, estrarano tenas sian oficon por du jaroj. Do ilia estraraneco finiĝas en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. Ambaŭ pretas denove kandidatiĝi.
En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj kaj proponas al la membraro reelekton de s-ro Braun kaj d-ro Picasso.
5. Nia statuto, alineo 7.4 kaj 8, montras la procedon pri aprobo de la raporto pri agado kaj la financa raporto kaj elekto de estraranoj. Ĉi-jare ni aranĝos oficialan Ĝeneralan Kunvenon por nia membraro kadre de la Universala Kongreso en Rotterdam. Diskutado kaj aprobo de la raporto (vidu punktojn 1 - 3) kaj elekto de estraranoj (vidu punkton 4) okazos tie. Membroj, kiuj ne venos al Rotterdam, rajtas skribi komisi alian membron ĉeestontan pri aprobo kaj voĉdonado.

RAPORTO PRI LA AGADO DE IKEF DUM LA JARO 1987

MEMBRARO DENOVE PLIGRANDIĜIS

Dum la jaro 1987 la membraro denove pligrandiĝis, nome de 52 membroj komence de la jaro al 67 je la jarfino. Inter ili estas du DUMVIVAJ MEMBROJ, s-roj Mee (IKEF 2) kaj Voit (IKEF 17). La 67 membroj loĝas en 23 landoj.

Bedaŭrinde la enspezoj pro membrokotizoj regresis en 1987, ĉar multaj membroj ne pagis sian jarkotizon (Vidu la financon raporton).

La nombro de perantoj kreskis de 5 al 9. Ni havas nun perantojn en Britio, Francio, FR Germanio, Italio, Jugoslavio, Hungario, Koreio, Novzelando kaj Togolando. Ilia tasko estas verbado por IKEF en siaj landoj, kontakti Esperantistajn enkomi(k)istojn, kaj ankaŭ enkasigi la kotizon de la samlandaj membroj.

VERKA AGADO

En la revuo MONATO aperis dum 1987 multe pli da artikoloj pri ekonomiaj temoj de IKEF-membroj ol dum la antaŭa jaro. Ĉe tio estis aparte sukcesaj s-roj Rotsaert, Yamasaki, Pachter (IKEF 34) kaj Braun (IKEF 4). Ni memorigas ĉe ĉi tiu okazo, ke ĝenerale MONATC estu nia tribuno, nia bazo por prezenti al la Esperantistaro ekonomiajn fakartikolojn. Tial ni instigas tiujn membrojn, kiuj ankoraŭ ne ricevas MONATOn - internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo -, ke ili abonu ĝin. Per verkado de artikoloj vi eĉ povas gajni la kostojn de la abono.

Koncerne MONATOn estas bedaŭrinda fakto, ke en 1987 la nombro de entreprenaj reklamanoncoj malkreskis, kvankam unufoje s-ro Yamasaki sukcesis havigi anoncon de japana firmao aldone al la ĝisnunaj reklamanoncoj de germanaj firmaoj peritaj de s-ro Braun. Ĉar tiuj reklamanoncoj estas multflanke efika kaj utila agado, kaj ĝi alportas 15 % da makleraĵo al nia kaso, ni nepre devas plifortigi ĝin. Helpe de jam aperintaj reklamanoncoj vi pli facile sukcesos gajni iujn de aliaj firmaoj.

Menciindas, ke d-ro Goldman (IKEF 52) regule monate eldonas sian "Ekonomian Bultenon pri Usono", el kiu vi povas ĉerpi informojn pri la ekonomia stato de la plej granda okcidenta merkato. Ni varme rekomendas al vi la abondon de tiu bulteno.

INTERNACIA EKONOMIKISTA SIMPOZIO

Kadre de la 17a Vintra Esperantista Ferio okazis en Budapeŝto je la 27-29a de decembro la 2a Internacia Ekonomikista Simpozio. Ĝin organizis nia estrarano d-ro Gether (IKEF 7) kaj siaj samideanoj de la Ekonomikista Grupo de HEA. Bedaŭrinde la simpozion partoprenis ne tiom da niaj membroj, kiom ĝi estus meritinta.

KREO DE NOVA EMBLEMO POR IKEF

Al la alvoko por kreo de nova emblemo por IKEF alvenis ĉe la Ĝenerala Sekretario entute 14 proponoj. La estraro nuntempe antaŭelektas la tri plej bonajn. Ili estos baldaŭ prezentataj al vi por definitiva elekto fare de nia membraro.

LAŬOKAZA NOVAĴLETERO

Nia komunikilo, la "Laŭokaza Novaĵletero", bedaŭrinde havis negativan evoluon. Ĝi nur trifoje aperis dum la jaro 1987 kompare sesfoje dum la antaŭa jaro. Ankaŭ la celita plibeligo ne efektiviĝis. Entute la kaŭzoj pro tiu malboniĝado kuŝis en troa okupiteco de la redaktoro (la Prezidanto/Ĝenerala Sekretario), kiu malfruigis la preperon de la malneto, tro longa poŝtvojo inter FR Germanio kaj Hungario respektive Hungario kaj aliaj landoj, kaj fine ne sufiĉe atentema finfarado kaj kopiado fare de la Ekonomikista Grupo de HEA en Budapeŝto.

Ni devas do konstati, ke la kostoj por la Novaĵletero ja regresis, (Vidu la financon raporton), sed samtempe ankaŭ senteble malboniĝis aperakurateco kaj ĝenerala aspekto. Sed la estraro celas al bona komunikilo inda por fakuloj kiel ni, eĉ se la kostoj poste ree plialtiĝos. Tiurilataj decidoj devas esti faritaj en la venontaj semajnoj.

ESTRARA LABORO

La estraro pligrandiĝis per alekto de s-ro Yamasaki, Japanio, al sep estraranoj. Tio estas laŭ la statuto, alineo 7.2 unua frazo, la maksimuma nombro de estraranoj. Ĉiuj venas el diversaj landoj; tio montras modelan internaciecon.

La estraro interkomunikas per t.n. "Diskutpaperoj", kiujn dissendas la Ĝenerala Sekretario al la aliaj estraranoj. Ĝi kolektas la opiniojn de ili kaj pelas la aferon al ĝia decidpunkto. Laŭ nova regulo ni ŝanĝis la sistemon pri estraraj decidoj de unu-animeco al 2/3-plimulto.

GENERALA KUNVENO 1987 EN VARSOVIO

La ĉi-jara Ĝenerala Kunveno de IKEF-membroj okazis kadre de la Universala Kongreso de UEA en Varsovio je la 27a de julio. Ĝi elvokis grandas intereson ĉe la ekonomi(k)ista Esperantistaro, ĉar krom 15 IKEF-membroj ĉeestis ĉirkaŭ 40 interesitoj. La estraranoj Braun, d-ro Gether kaj Gilbert gvidis la kunvenon kaj la diskutadon.

Pliaj renkontiĝoj inter IKEF-membroj estis aranĝataj, nome ĉe la Germana Esperanto-Kongreso dum Pasko en Rastatt, ĉe la Internacia Foiro pri Fiŝkaptado komence de junio en Ancona/Italio - al kies organizintaro apartenis nia estrarano d-ro Picasso - kaj fine ĉe la 2a Internacia Ekonomikista Simpozio je la 27-29a de decembro en Budapeŝto.

TERMINOLOGIA LABORO

Dum 1987 IKEF komencis la tradukon de la kvinlingvan "Ŝlosilvortan terminaron" de la Internacia Komerca Kamro ("Key words in international trade", ICC, Paris). Ĉe tio apartan laŭdon meritas niaj membroj s-ro Roland Rotsaert (IKEF 3), kiu en ege mallonga tempo, kvazaŭ per unu bato, faris la unuan tradukon de la 1500 nocioj, kaj s-ro Hans Wiersch (IKEF 19), kiu kontrolis la tradukon de s-ro Rotsaert. Ankaŭ tiun laboron finis s-ro Wiersch ĝis la jarfino. Restas nun por la sekva jaro pridiskutado kaj findecido pri nocioj, pri kiuj s-roj Rotsaert kaj Wiersch ne trovis konsenton (ĉ. 30 %). Tiuj terminoj estos pludiskutataj de s-ro Mee (IKEF 2), d-ro Polerani (IKEF 12) kaj s-ro Yamasaki (IKEF 43). Tio estas kompreneble la plej malfacila kaj tempo-bezona laboro pro la perkorespondada diskutado. Intertempe s-ro Gilbert (IKEF 14) kontaktos la Internacian Komercan Kamron (ICC) en Parizo por konvinki ĝin, ke ĝi reveldonu la "Ŝlosilvorton" kun Esperanto kiel plia lingvo.

Por 1988 ni planas baldaŭ komenci la tradukon de la vortaro "Ekonomio - Financo - Mono" (Economie - Finance - Monnaie) de la Eŭropa Komunumo.

S-ro Wiersch estas nomumita IKEF-centro (kunordiganto) de nia terminologia laboro. Ĉar pro aĝo kaj nesufiĉa sanstato li volas agi nur interne de tiu terminologia laboro, sed ne funkcii kiel reprezentanto de IKEF en internaciaj kunvenoj pri terminologio organizotaj de UEA aŭ alia instanco. TEC (Terminologia Centro de UEA) petis nin, ke IKEF sendu reprezentanton, kiu aliĝu al TEC kaj regule kunlaboru tie pri terminoj el nia fako komerco kaj ekonomio. S-ro Rotsaert deklaris sin preta provizore funkcii kiel IKEF-representanto ĉe TEC.

FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1987

(la sumoj estas en belgaj frankoj, inter krampoj la sumoj de la antaŭa jaro)

Spezokonto por la jaro 1987		Reveno	
Kostoj			
Ĝeneralaĵoj, inkl. deprezoj	1 439 (2 294)	Membrototizoj	15 662 (16 989)
Kostoj de materialoj	- (3 825)	Donacoj, trompagoj de membroj	2 557 (9 210)
Kostoj de Novaĵletero	5 402 (13 976)	Ricevita rentueco	- (323)
Kostoj de afanko t. s.	8 712 (6 555)	Gajno pro peradvento (nete)	- (314)
Kostoj de informado t. s.	- (830)	Gajno pro reklamaĵoj kaj kurtagoj	2 970 (7 560)
Veturkostoj estraranoj	- (8 749)		
Gajno por la jaro	5 636 -	Malgajno por la jaro	- (1 825)
	-----		-----
	21 189 (36 229)		21 189 (36 229)

Bilanco je 1987.12.31		Pasivo	
Aktivo			
Starigaj kostoj, nete de deprezoj	- (789)	Kotizoj antaŭpagitaj	6 263 (8 506)
Biblioteko	896 (1 120)	Kapitalo pro dumvivaj membroj	13 815 (14 189)
Postĉekkonto belga	20 297 (28 751)	Subtena fondaĵo	504 (92)
Konto de Universala Esperanto As.	9 703 (367)	Kreditoroj diversaj	1 419 (441)
Konto de Flandra Esperanto-Ligo	3 570 -		
Debitoroj diversaj	890 -	Kapitalo	7 719 (9 544)
		(mal)gajno	+5 636 (-1 825)
		Nete	13 355 (7 719)
	-----		-----
	35 356 (31 027)		35 356 (31 027)

Detaligo

Kapitalo pro dumvivaj membroj: Nee, Voit.
 Debitoroj diversaj: Braun: 890
 Kreditoroj diversaj: Instituto Dex: 650
 HEA: 769 (pagota Laŭokaza Novaĵletero 18)

Komentario

La Laŭokaza Novaĵletero nun estas presata en Hungario. Pro tio la kostoj konsiderinde malpliiĝis. Aliflanke la problemoj de preskvalito kaj regula aperdato bezonas solvon.

Flandra Esperanto-Ligo (la eldonanto de la revuo Monato) malfermis konton por IKEF, je kiu ĝi pagas la kurtaĝojn pro reklamanoncoj en la revuo.

El pristudo de la kotizpagoj mi konstatas ke 20 membroj pasintjare ne pagis sian kotizon (Germanio 5, Italio 4, Britio 4, Danlando, Kameruno, Japanio, Venezuelo, Belgio, Tuzolando, Francio po 1). IKEF ja havas kasiston kaj perantojn, sed ĝis nun mankas taŭga sistemo por atentigi la membrojn pri la kotizpagoj. Baldaŭ mi sendos al la perantoj liston de la nepagintaj membroj; mi persone alskribos la nepagintojn el la aliaj pagpovaj landoj. Viaj opinioj pri tiu problemo estas bonvenaj.

87.01.17

Roland Rotsaert, Financa Konsilanto



RESUMO KAJ ESTONTECA PERSPEKTIVO

La nombroj de membroj kaj tiu de perantoj kreskis. La estraro montras internacian ekvilibron; la "klimato" inter la estraranoj estas bona, ili diligente kunlaboras. Kvanto kaj kvalito de agadoj ĝenerale kreskis - kun esceptoj kiel "Laŭokaza Novaĵletero" - ankaŭ ne-estraranaj membroj disvolvis pli da aktivecoj, tamen kompare al la nuna relative granda membraro kaj kompare al la celitaj taskoj starantaj antaŭ ni, IKEF devas evolui pli da dinamismo.

La intereso de la Esperantistaro pri IKEF plialtiĝis, kaj ankaŭ tiu de la ekstera mondo. La grundo por plia sukceso estas fekunda. Ni devas nur diligente prilabori ĝin, por havi poste riĉa rikolto. Do la perspektivoj entute ŝajnas esti favoraj.

INTERKONATIGO

Novaj membroj

Ni plezure bonvenigas kiel novan membron

70 S-ro P.H.H. PARREN
 Heimansstr. 18
 NL-6285 AM Epen
 Nederlando

Adreso-saĝoj

Jen novaj adresoj de membroj:

53 S-ro Michael HERRMANN
 Fördererstr. 17
 D 7730 Villingen-Schwenningen
 F.R. Germanio

63 S-ro Robert EBENAU
 Sportstraat 62
 NL 5705 JH Helmond. Nederlando

Donacoj al nia kaso

S-ro Lawrence MEE (IKEF 2) 137 bfr
 S-ro Hans WIERSCH (IKEF 19) 85 bfr

Multan dankon al ili!

Limdato por kontribuadoj al LN 21: 10 junio 1988.

IDENTECSILDOJ

- 5 Per HAGEMANN, s-ro
Horserødvej 18
DK-2100 København Ø
Danlando
Naskita 1959
Komerca ekonomiisto
Interesiĝas pri internaciaj
monunuoj (ekze la Stelo)
- 53 Michael HERRMANN, s-ro
Fördererstr. 17
D-7730 Villingen-Schwenning
F.R. Germanio
Profesio:
Entrepren-ekonomiisto ĉe
DRESDNER BANK (duagrada
okcidentgermana banko
laborante mondvaste)
Lingvaj eblecoj:
angla, iomete franca
Kapabloj:
-doni konsilojn pri diversaj
monaferoj (investoj, privataj
kaj publikaj kreditoj, in-
kaj eksterlanda transpago)
-klopodi pri tranokt-eblecoj
kaj detalaj informoj dum/pri
la SUD-WEST-MESSE en Villin-
gen-Schwenningen (komerca
kaj mastrumada foiro, okazas
en junio ĉiujare).
- 56 HAN Moo hyup, s-ro
C.P.O. Kesto 5154
Seoul 100-651,
Koreio
Tel.: 756 7053, 756 7054
Estro de asekura kooperativo
Ĉefredaktoro de La Espero
Lingvaj kapabloj:
angla, japana, ĉina
Kapabloj kaj rilatoj:
havas intimajn rilatojn kun
divers-specaj kompanioj,
eĉ kun registaro.
- 57 NAM Won seop, s-ro -
403 ho Dongyang Bldg,
683-17 Yoksam dong
Kangnam ku,
Seoul 135-080, Koreio
Tel.: 555 4426 (oficejo)
412 9266 (hejmo)
- 57 (daŭrigo)
Estro de eksporta entrepreno
Lingvaj kapabloj: angla
Eksportdeziroj:
Ĝuoj kaj vestaĵaj artikloj
- 59 RHEE Hak sun, s-ino
405 ho Students' Cultural Centre
18 Moojeong dong, Joong ku
Seoul 100-380, Koreio
Tel.: 269 4706, 275 9142 (oficejo)
744 8079 (hejmo)
Estrino de Gjubin entrepreno
Eksportdeziroj:
ĉiuj agrikulturaĵoj
- 62 Paolo CERRETINI, d-ro
Via San Giusto, 14
I-56100 Pisa, Italio
Tel.: 050-24527 hejmo,
preferinde alvoki vespere
Studtitolo: Doktorigo en medicino
Profesio: Dentisto
Lingvaj kapabloj: angla
Apartaj kompetencoj:
fabrikado de dentaj protezoj
specialaj, malpezaj kaj komfortaj,
realigataj dum unu tago, kun tre
kontentigaj rezultoj ankaŭ por
malfacilaj kazoj
Specialaj servoj:
-Povas helpi ĉiu-landajn eksport-
importistojn en iliaj rilatoj kun
italaj firmaoj;
-Povas esti peranto, sed mem ne
ventas aŭ aĉetas;
-Povas doni konsilojn pri medicini-
problemoj, ĉefe pri dentmalsanoj
NB: Inform-petoj tre bonvenaj,
respondo garantiata.
- 63 Robert EBENAU, s-ro
Spoortstraat 62
NL 5705 JH Helmond
Nederlando
Tel.: 31 4920 42402
Komercesto, vendisto;
Lingvaj eblecoj:
angla, franca, germana

IDENTECSILDOJ (daŭrigo)

- 63 (daŭrigo)
Specialaj servoj:
Respondecas pri komercaj
rilatoj por la 73-a UK 1988
en Rotterdam. Ankaŭ deziras
tiurilatajn kontaktojn.
Kapabloj:
Vendado/eksportado de i.a.
mebloj el metalaj tuboj kaj
liguro por ĝardeno kaj plezuro,
infanveturiloj kaj -seĝoj,
kusenoj, savjako.
- 69 COVALEX S.A.
Les Cascades
CH-3961 Mollens (Svislando)
Tel.: 027 - 416245
Estro: s-ro André PIERRARD
Celo de la kompanio:
Kunordigi, plivalorigi kaj
ekspluati per eldonado la
rezultojn de esploradoj,
ĉefe en la kampo de novaj
teknologioj kiel perkomputila
instruado, lernado kaj formigo.

OFICIALAJ INFORMOJ de L'AKADEMIO de ESPERANTO

Nova serio N°5 Julio 1986

Sendependa lingvo-institucio fondita de D-ro L.L.ZAMENHOF en 1905

D-ro A.ALBULT, 21, rue de Verfeil F 31200 TOULOUSE, Francio

Post studo kaj propono de la Gramatika Sekcio la Akademio voĉdone
akceptis jenan rezolucion:PREPOZICIAJO POR LA SUBJEKTA SUPLEMENTO

1. Post ita/ata/ota-vorto, la aganto estas indikita per DE. Ekz-e, ŝi estas amata de ĉiuj. (6-a Regulo de la Fundamenta Gramatiko).
2. Post o-vortoj, DE povas indiki la aganton, se neniu alia koncernato estas ebla. Ekz-e, la kanto de la birdoj, la projekto de la inĝenieroj (Fundamento), la parolado de la oratoroj, k.s.
3. Por indiki la aganton post o-vortoj en aliaj kazoj, la plej ĝenerale akceptita formo estas FARE DE. Ekz-e, la akcepto de la kongresanoj fare de la urbestro; la traduko de Hamleto fare de Zamenhof.

La Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko,
Michel DUC GONINAZLa Prezidanto,
D-ro A.ALBULTREPRESO DE LA OFICIALAJ DECIDOJ DE LA AKADEMIO ESTAS DEZIRINDA EN ĈIUJ
PERIODAĴOJ

NIAJ MEMBROJ EN KOREIO FURORAS

De s-ro Sung Keun HONG, Seoul, Koreio, mi ricevis jenan leteron (nur parte represita) de la 13a de februaro 1988:

"Estimata samideano,

Grandan nonoron ni ĉi jare havas aldoni vin la duan mesaĝon pri la IKEF movado en la matenkvieta duoninsulo, Korea respubliko. De post la 18a tago de pasinta Januaro, kiam ni simple skizis pri la ekpaŝo de IKEF movado en Koreio, nun denove tamen ni pli agrablinde petas vin aŭskulti pri niaj eklaboroj je sia disvastigo kaj ties plifortigo.

Ek de la komenco de februaro ĉi monate, prezidanto de Korea Filio de IKEF, sinjoro HAN Moo Hyup afablis uzi unu parton de sia oficejo kiel la centra laborejo de Korea filio. Krome li min elektis kiel la ĉef-helpanto (aŭ ĉu kiel sekretario?), kiu studas la ĉinan lingvistikon en la Fremdaj Studoj. Kiel bona starto de nia movado en Koreio! Tiu malfermo de nia laborejo signifas, ke ni necesas pli multe da zorgo, helpo, afableco ka. de vi, por ke ni povu pli efektive labori kaj kreskigi la Esperantujojn en nia lando, kiun oni fokusas pro la gravaj renkontiĝoj internaciaj ekzemple, Seoul Internacia Artfestivalo, 88 Olimpikaj Ludoj, Pen Internacia ktp.

Plej laste, ni tutkore atendas Vian favoran respondon, kaj deziras pli da antaŭenpaŝoj de Via movado tuta.

Sincere via
HONG Sung keun
Ĉefhelpanto de la IKEF
filio de Korea respubliko"

Sed la plej granda kaj agrabla surprizo estis aldonado de Laŭokaza Novaĵletero n-ro 18 en korea lingvo kaj skribo. Ĉi-apude estas montrita la unua paĝo kiel ekzemplo.

Multegan laŭdon kaj dankon al s-roj Han kaj Hong kaj al la tuta IKEF-membraro en Koreio.

Franz Josef Braun

Pri PUBLIKAJ RILATOJ (angle: Public relations)

Laŭ la naŭlingva Internacia komerc-ekonomika vortaro (IKEV) Publikaj Rilatoj signifas:

"Kulturado de P.R. estas la sistema kaj celkonscia strebado al favora konateco de ĉiuj grupoj de kiuj entreprenoj pli malpli dependas."

S-ro Hans Wiersch (IKEF-19) transprenis la taskon verki por nova libro germanlingva dupaĝan artikolon pri la temo "Esperanto kaj la publikaj rilatoj". Li intencas ĉe tio mencii ankaŭ la nomon kaj celon de IKEF. S-ro Wiersch serĉas nun materialon por la citita temo. Se vi havas ideon kaj povas helpi lin, bonvolu rekte alskribi s-ron Hans Wiersch, Tilsiter Str. 39, D 7063 Welzheim.

새 소식 편지

국제 상업·경제회

기관지

Organo de la

Internacia

Komerca kaj Ekonomia

Fakgrupo

임시 본부

Hornisgrindestrasse 8,

7580 /bühl 16.

Ekonomia Fakgrupo)

F.R.Germanio

18호

1987. 11

존경하는 동지들에게!

마침내 이 "새 소식 편지"를 귀 회원께 보내드립니다. 이번 호 역시 늦었습니다. 그러나 1년에 4회 발행하는 것이 보다 편리한 것으로 생각되며, 편집자에게 보내오는 자료나 회원의 활동을 고려할 때 이 회수가 타당한 것으로 보여집니다.

이번 호의 가장 큰 소식은 바르샤바에서 개최된 72차 세계 에스페란토 대회 중 개최된 성공적 총회에 관한 사항입니다. Gilbert 임원께서 이에 관하여 쓰셨습니다. (3쪽을 보십시오) "새소식" 16호에 제시된 바있는 모든 안건들은 채택되었습니다. 이로서 우리는 7명의 실로 국제적 임원진을 구성하였습니다. 더 중요한 행사가 우리앞에 놓여있습니다.

헝가리 부다페스트에서 87년 12월 28, 29일 양일간 개최된 예정인 "제 17차 겨울 에스페란토 총회"기간동안 제2차 국제 경제학자 심포지움이 본 기관과 헝가리 에스페란토 협회의 경제학자 분과에 의해 개최될 예정입니다(10쪽을 보십시오) 만약 귀 회원께서 크리스마스과 새해 기간동안 계획이 없으시면 부다페스트로의 여행을 선택하십시오! 가능하면 심포지움에서 강연을 할 수도 있습니다. 그리고 에스페란토 전문가들과 함께 기쁜 휴가를 즐기십시오!

당신의 Franz Josef Braun

TERMINOLOGIA LABORO

Antaŭ kelkaj semajnoj alvenis la TEC-bulteno n-ro 1988/1. (TEC = Terminologia Esperanto-Centro, oficiala institucio de UEA por plibonigo kaj unuecigo de la terminologia laboro en Esperanto). Tiu bulteno konsistas el la raporto pri la 1a Konferenco de TEC je 1987-07-27 dum la Unua en Varsovio (Fondkunveno de TEC) kaj el la Regularo por TEC.

Ĉi-apude ni represis por via informo la Regularon por TEC. En la fondkunveno en Varsovio partoprenis inter multaj aliaj ĉeestantoj ankaŭ du IKEF-membroj, nome s-ro Johan Andreas PACHTER (IKEF 34) kaj d-ro Gianfranco POLERANI (IKEF 12). Bonvolu permesi al mi aldoni kelkajn vortojn, parte resumon el la diskutokontribuoj en la konferenco.

UEA klare ekkonis la neceson por kunordigita kaj pli efika terminologia laboro, se Esperanto estonte havu sancon por grava funkcio en la internacia interkomunikado. Aparte necesas ĝisdatigi la fakterminarojn. Ankaŭ ni en IKEF ja konsciigis pri la manko de tutampleksa vortaro pri nia fako komerco, ekonomio, ekonomiko (kiel ekzemple ekzistas en la germana "Gablers Wirtschaftslexikon" = Ekonomika leksikono de la eldonejo Gabler, Wiesbaden).

Eble vi legis lastatempe pri la ĝojiga progreso de la traduk-sistemo DLT de la nederlanda firmao BSO, kiu uzas Esperanton iom modifita kiel pontlingvon por la maŝina traduko. Ankaŭ ili sentas la mankon de ampleksaj fakaj vortaroj.

Jam delonge ni ekkonis, ke sur nia kampo komerco/ekonomio/ekonomiko la terminologia laboro estu nia plej grava tasko. Ne hazarde ankaŭ en nia statuto, alineo 4.1.2, la terminologia laboro staras antaŭe. Tial, estimataj gekolegoj, mi ankoraŭfoje volas atentigi vin al la graveco de tiu tasko, kaj peti vin, ke vi, almenaŭ tiuj kiuj havas talenton por tio, pretu kunlabori kiel ajn en nia terminologia agado. Dankon!

Franz Josef Braun

Anonceto de d-ro Picasso:

S-ro AMOUZOUVI EKOUE ATTAH, c/o. Mlle. N'Sougan Delaly, B.P. 383, Lomé, Togolando, (juna Esperantisto), deziras studi en Eŭropo pri "merkato, surmerkato" kaj serĉas gastiganton kaj laboreton.

Veraj eldiraĵoj:

Necesas multaj pensoj por kapti unu solan.

Stanislaw Jerzy Lec

Neniu posedas la veron, ni ĉiuj serĉas ĝin.

Karl Jaspers

Nenio daŭras pli longe ol io provizora

Nekonato

Regularo por Terminologia Esperanto-Centro (TEC)

- 1 **Statuso**
TEC estas institucio de Universala Esperanto-Asocio, laŭeble kunlaboranta kun la Akademio de Esperanto (AdE), Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE), fakaj Esperanto-asocioj (FA), landaj Esperanto-asocioj (LA) kaj ĉiuj ceteraj rilataj institucioj de la Esperanto-movado.
- 2 **Celoj**
 - 2.1 **Plibonigo kaj unuecigo de terminologia laboro en la internacia plan-lingvo Esperanto.**
 - 2.1.1 **Studado de rezultoj de internacia terminologi-normiga agado, ilia adapto al bezonoj de Esperanto kaj diskonigo de rilataj scioj (t.e. esploro kaj instruo).**
 - 2.1.2 **Organizado de internacia, faka kaj interfaka diskutoj pri terminar-proponoj.**
 - 2.1.3 **Organizado de aproba procedo, inkluzive la lingvan kontrolon kaj finan aprobon fare de AdE.**
 - 2.1.4 **Eldonado de normaj dokumentoj, precipe terminaraj kaj ilia reviziado.**
 - 2.2 **Reprezentado de Esperanto en naciaj kaj internaciaj terminologiaj kaj normigaj institucioj, kontakte kun UEA-Komisiono pri eksteraj rilatoj.**
- 3 **Konsisto kaj labormetodo**
 - 3.1 **TEC konsistas el gvidantoj kaj kunlaborantoj.**
 - 3.2 **TEC laboras per sekcioj kaj komisionoj.**
- 4 **Gvidstrukturo**
 - 4.1 **Respondeca organo de TEC estas la Estraro: Prezidanto, Sekretario, Financa Administranto, Sekciestroj.**
 - 4.2 **Gvida organo de TEC por konceptaj kaj perspektivaj problemoj estas la Komitato: Estraro, Konsilantoj, reprezentantoj de institucioj, de LA kaj FA kaj komisiitoj de TEC-Sekcioj.**
 - 4.3 **La Konsilantoj konsilas meminitate aŭ laŭpete pri ĝeneralaj kaj specialaj demandoj, rilatantaj terminologiajn aktivcojn.**
 - 4.4 **La reprezentantoj de AdE, CED, ISAE, LA kaj FA zorgas pri reciproka konsidero de la interesoj de siaj institucioj kaj TEC.**
 - 4.5 **La Prezidanto ĉefe reprezentas TEC en la Esperanto-movado kaj ĉe ekstermovadaj instancoj.**
 - 4.6 **La UEA-Komitato aprobas la TEC-Estraron principe por 3-jara periodo.**
- 5 **Financoj**
 - 5.1 **La ĉefa financa bazo de TEC estas la Fondaĵo Wlster.**
 - 5.2 **Pri la plej efika uzado de la rimedoj decidas financa komisiono konsistanta el la Prezidanto, la Financa Administranto kaj la Sekretario de TEC.**
 - 5.3 **Ĉefa tasko de la Financa Administranto estas faksperta konsilado al la Financa Komisiono.**
 - 5.4 **Gvidantoj kaj kunlaborantoj de TEC laboras senpage.**
 - 5.5 **La Sekretario ricevas salajron, pri kiu interkonsentas la Estraroj de UEA kaj TEC.**
- 6 **Eldonaĵoj**
 - 6.1 **Normaj dokumentoj: terminaroj (TER), preskriboj (PRE), (norm-)tradukaĵoj (TRA), k.a.**
 - 6.2 **Raportoj, artikoloj kaj studoj pri terminologiaj temoj.**
 - 6.3 **TEC-Bulteno, informilo por TEC-anoj kaj interesoitoj.**
- 7 **Sidejo kaj Sekretariejo**
 - 7.1 **La sidejo de TEC kaj administrejo de Fondaĵo Wlster estas la Centra Oficejo de UEA.**
 - 7.2 **La sekretariejo de TEC estas en la loĝloko de la sekretario.**
- 8 **Ŝanĝoj**
Ŝanĝoj en la regularo okazas propono de TEC kaj konsente de la UEA-Komitato

1987-07-24 Varsovio

Terminologia Esperanto-Centro
Normiga Sekcio, Ing. Jan Pospíšil
Lublaňská 49, 120 00 Praha 2 - Vinohrady, Ĉeĥoslovakio

Terminologia Esperanto-Centro
Sekretario, Ivan Bujdosó
H-1368 Budapest, pf. 193, Hungario

Terminologia Esperanto-Centro
Rejo de Reprezentantoj, Wera Blanke
DDR-1141 Berlin, Otto-Nagelstr. 110 Pf 113-05

Terminologia Esperanto-Centro
Sidejo, UEA (en konsultaj rilatoj kun UNESCO)
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Pro religia malpermeso veraj financaj institucioj apenaŭ povis ekzisti en la Eŭropo de la 13a-14a jarcento. La eklezio opiniis ke interezo je deponita mono egalas al uzuro; nur partopreno en kapitalo de komerca entrepreno kun propra partopreno en la tiurilataj riskoj estis permesata.

Estis nur du veraj financaj centroj en la tiama Eŭropo; ili akiris sian gravecon ĉar samtempe ili estis komercaj centroj. Temas pri:

- Grupo da norditalaj urboj (*Genova, Firenze...*) kiuj geografie estis bone situataj por regi la komercon inter Azio kaj okcidenta kaj norda Eŭropo.

- *Brugge* (nun Belgio) kie komercistoj el suda (Italio) kaj norda (Skandinavio, regiono de la Balta Maro) Eŭropo havis siajn oficejojn kaj staplejojn.

La italaj komercistaj familioj do samtempe aktivis en siaj italaj hejmurboj kaj en *Brugge*. Komence ili nur okupis pri la financaj aranĝoj kiuj rilatis al la propra komerco inter ambaŭ regionoj. Ĉar ili estis la nuraj fakuloj en *Brugge*, ili baldaŭ ekokupis sin pri la financoj de la potenculoj de la regiono. Temis kutime pri pruntoj por pagi militojn. Unuflanke, bonaj rilatoj kun la lokaj gravuloj estis bonvenaj el komerca vidpunkto. Aliflanke, estis pluraj riskoj: la malpermeso de interezo daŭre ekzistis (kvankam ankaŭ altrangaj ekleziuloj prunteprenis monon !) kaj en militoj ĉiam estas malvenkinto. Plurfoje italdevenaj komercistoj bankrotis aŭ nur malfacile reakiris sian monon.

Dum la 16a jarcento la gravaj komercaj firmaoj forlasis *Brugge* kaj translokis siajn sidejojn al aliaj urboj: *Antwerpen, Amsterdam, London...* La kialoj ankoraŭ ne estas tute klaraj. La fakto ke la haveno de *Brugge* ne plu estis facile akirebla por marŝipoj certe ne estis la nura kialo. Tio estis la fino de la urbo kiel komerca kaj financa centro.

Ankaŭ familioj el alia itala regiono, nome *Lombardia* (ĉefurbo Milano), okupis pri financoj en la tiama Eŭropo. Ili donis sian nomon al sia propra oficejo: lombardisto. (PIV: lombardi - deponi ĉe tiucela oficejo garantiaĵon kontraŭ mona alprunto; lombardisto - tiu, kiu pruntedonas monon kun interezo, kontraŭ la garantio de persona posedaĵo deponita ĉe ili.)

Kompreneble, ankaŭ por la lombardistoj validis la eklezia malpermeso de pruntoj. Tamen, ĉar ŝpari monon en tiu epoko estis preskaŭ nebla, lombardo estis socia neceso. Oni solvis la problemon per gravega impostado de la lombardistoj. La lombardistoj tiel kompensis siajn pekojn per monpagoj al eklezio kaj loka registaro. Bedaŭrindaj sekvoj estis ke kosto de lombardo estis altega kaj ke "lombardisto" iĝis fivorto.

En postaj jarcentoj la registaro plejofte transprenis la lombardejojn. En Britio lombardejoj ankoraŭ estas privataj komercaj entreprenoj.

COVALEX S.A.
KOVALEKS S.A.

"Les Cascades" - CH - 3974 Mollens - Tel. + 41 - 27/41.62.45

PROPONAS KOMPUTOR-PROGRAMOJN PRI TAJP-LERNADO

DACTYLEX
DAKTILEKS

por IBM aŭ IBM-kongruaj komputoroj, verkitaj de psiko-pedagogo, profesoro pri tajpado kaj programisto-matematikisto, ĉiuj el universitato aŭ altlerneja nivelo.

La nunaj versioj ekzistas france por klavaroj "AZERTY" (B, F, L,...) kaj "QWERTZ" (CH), por komputoroj kun aŭ sen grafika karto. (Proveksemplaro kun disketo kostas 15 Fr - Svislandaj - aŭ per Eŭroĉeko aŭ per poŝtgirkonto Svislando 19-5223-7 al Covalex S.A., 3974 Mollens - Svislando).

Ni aktive laboras pri la traduko nerderlande (B), germane (CH) kaj esperante (qwerty).

Ni volas trovi PAGITAJN KUNLABORANTOJN por traduki la literaturan parton (ne la programadon) unue en :

malsamaj klavaroj QWERTY por NL, GB, USA, I, E,

kaj poste alialingve laŭ naciaj proponoj.

Tiuj kunlaborantoj :

DEVIGAS : - esti profesor(in)o pri tajpado en sia lingvo;
- kompreni almenaŭ unu el tiaj lingvoj : Esperanto, F, NL, GB, USA, I, D, E, kun nia helpo se necesas;
- komuniki la petitan horsalajron en nacia mono;

NE DEVAS : - esti programistoj (sed povus);
- kopii lernolibron, kies ili ne estas la aŭtoroj;

Ili laboros hejme, en alia nacia loko aŭ en Svislando laŭdezire dum 1 - 2 tagoj, semajne, sabate aŭ dimanĉe. Ni facile povos iri ĝis iliaj hejmoj por prezenti la strukturon de la programo, helpi al la verko kaj...honorarii la laboron.

Ni povus kontrakti akordon kun regionaj aŭ naciaj importistoj el tiujlingvaj landoj pri vendado de tiuj programoj.

Skribu al : André Piérard
COVALEX S.A.
"Les Cascades"
CH - 3974 Mollens

N/Ref. : 721/88

Teletex

La PTT-servoj de Belgio nunmomente reklamadas pri nova servo: Teletekso. Post provperiodo de unu jaro, la servo ekde nun plene ekfunkcias. Ĝi jam estas uzata en plejparto de la mondo; precipe la evolulandoj kaj Orient-Eŭropo ankoraŭ mankas. Pri Britio mi ne trovis precizajn informojn. Eble "PRESTEL" estas la brita versio de Teletekso ?

Teletekso estas plibonigo de telekso. Telekso havas nur limigitan signaron kaj apenaŭ evoluis dum la pasintaj jardekoj. Teletekso estas ege rapida (ĝi uzas komputorajn transmisiliniojn) kaj ĝi havas signaron de 309 signojn, kiu permesas skribi ĉiujn latindevenajn alfabetojn, ankaŭ la Esperantan.

La kostoj por instali teletekson estas sufiĉe altaj: terminalo kostas ol 300.000 belgajn frankojn (10.000 usonajn dolarojn). La kosto por sendi mesaĝojn estas pli malpli egala al tiu de telekso. Per teletekso eblas atingi telekson, kaj inverse.

Teletekso povas esti grava por Esperanto. Dum la pasinta jardeko la Esperantistoj daŭre plendis ĉar komputora presado de Esperanto-tekstojn estis nebla aŭ malfacila. Nun ni ricevas kvazaŭ donace sistemon kiu estas perfekte uzabla de ni. Ankoraŭ ne ekzistas personaj komputoroj kiuj estas kongruaj kun teletekso, sed ni antaŭvidas ke la fabrikantoj - pro la nuna daŭso en komputoraj signaroj - adaptos sin al la nura internacia normo.

Pliaj informoj pri teletekso, precipe komentoj de personoj kiuj uzas la sistemon, estas tre bonvenaj.

Roland Rotsaert

AL INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO (IKEF)

Financa sidejo:
S-ro Roland Rotsaert
Visspaanstraat 97
B 8000 Brugge/Belgio

Aliĝilo

Per tio ĉi mi/ni petas aliĝon al la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF), kiel individua persono (entrepreno) alia instanco. Mi/ni deklaras la intencon subteni la statuton de IKEF kaj finance kontribui al la mastrumado de la fakgrupo.

Nomo, sub kiu la membreco estiĝu:

Plena poŝtadreso:

S-ro/S-ino/F-ino Jaro de naskiĝo/fondiĝo

Profesia okupo kaj agadkampo(j)

Maniero de kotizpago

Aliaj rimarkoj

Loko/dato Subskribo